

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

POR LA ĜENERALA KUNVENO DE Ĉ. A. E.

Pri nia „Neagrabla artikolo“ venis kelkaj leteroj kaj aliajn ni atendas, ĉar volonte ni aŭdas opiniojn de niaj legantoj.

Unu samideano skribas: „La ideon pri monata unukrona imposto por propagandaj celoj mi trovas bonega. Plej alloga ŝajnas al mi ĉe tio la cirkonstanco, ke per negranda ofero poparta estas eble havigi por niaj celoj sumon, kiu ebligus grandstilan propagandon sisteman. Se la ideo estos komprenata de ĉiu j, tiam povus ŝanĝiĝi la nuna stato, dum kiu la movado estas alrاديگinta nur en lokoj, kie hazardе trovis sin iu persono sufiĉe fervora por varbi aliajn. Tiam Asocio povus je sia kosto organizi paroladojn kaj kursojn en multaj gravaj urboj, kiuj por nia movado nun signifas ankoraŭ teron novan.“

Tio ĝuste respondas al niaj spertoj kaj al la delongtempa deziro, ke nia movado estu disvastigita sur certa teritorio egalmezure. Sufiĉaj rimedoj propagandaj ebligus tion. Ni dezirus, ke la ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, okazonta la 23. Marto en Praha, trovu tempon por pridiskuti tiun ĉi aferon kaj ankoraŭ kelkajn aliajn, pri kiuj volonte gvidantoj de ĈAE aŭdas opinionon de la membroj.

Ekzemple, estas decidote ankoraŭ pri kotizo de nia Asocio al la centro de Naciaj Societoj Esp. (Konstanta Rezentantaro), zorganta, krom alio, pri sekretariejo de la Lingva Komitato kaj Akademio, kotizo, kiu devas laŭ la kongreso de Helsinki egali unu dekonon de la membra kotizo de UEA, kio por ni faras 2 Kĉ jare de ĉiu membro de ĈAE.

Alia afero pritraktota devus esti la pli-

vastigo de la gazetara servo de nia Propaganda Sekcio. Multaj el la legantoj, partoprenante en tiu ĉi servo, konas la aferon. Al la aliaj ni donos volonte informojn. La laboro, kiun ni postulas de la kunlaborantoj, bezonas unu aŭ du kvaronhorojn semajne kaj povas esti facile plenumata eĉ de t. n. izoluloj.

Ni opinias tre grava tiun ĉi manieron de propagando, per kiu la publiko konstante estas atentigata pri progreso de esperanto. La spertojn de ni akiritajn ni intencas prezenti al la Paska Konferenco en Genevo kaj interkonsenti tie kun la reprezentantoj de aliaj Naciaj Societoj esp. pri ĝeneraligo kaj enkonduko en la landoj, kie ĝi ne ekzistas.

Nur unu malavantaĝon havas tiu ĉi speco de propagando: ĝi neniel estas rapida rimedo fariĝi fama, tial eble iuj ne ŝatas ĝin. Sed la plej grandaj sukcesoj de nia movado restus senfruktaj, se aro da diligentaj, konstante laborantaj formikoj ne zorgus pri tio, ke la legantoj de nacilingvaj ne esperantistaj gazetoj sciu pri ili. Nur kiam la senbrua, sed senlaca laboro de tiuj ĉi amikoj konkuros la publikan opinionon de la mondo, nur tiam la aliaj sukcesos enkonduki esperanton ekz. en la lernejojn k. t. p. Se UEA donas al vi eblon jam nun uzadi esperanton, uzadu ĝin, sed krom tio estas ankoraŭ necese, ke estu organizita bone funkcia servo, per kiu ne esperantistaro sciigados pri tiu uzateco de esperanto.

R. H.

La venonta n-ro de La Progreso aperos la 26. Marto kaj alportos raporton pri la ĝenerala kunveno de ĈAE.

Se vi akceptas la gazeton nepaginte ankoraŭ, ni petas vin aboni nun. Por vi estas egale, ĉu vi pagas nun aŭ iam poste, sed al ni la frua abonpago faciligas laboron.

LITERATURO

SUONIO :

LA FROSTO

El la finna trad. F-ino Siiri Saikkola (Viipuri).

Estis somernokto en jaro 1857. La ĉielo estis klara kaj hela. Tiatempe Höytiäinen*) ankoraŭ ne estis malvasta, ŝlimborda laĝeto. Ĝia tiama regno okupis multajn mejlojn kaj longaj, trankvilaj ondoj disŝpruciĝis kontraŭ ĝiaj altaj arbaraj bordoj.

Je tiu ĉi nokta momento ĝi tamen ne moviĝis siajn ondojn, sed ripozis kiel senlima ebena spegulo. Nur iam la nokta spirito desegnis delikatajn sulketojn sur ĝian supraĵon.

Ĉie sur altaĵoj kaj en valoj kreskis densa arbaro en sia originala nobleco. Sed tiu ĉi altaĵo ŝajnis alia. Kelkloke sur ĝiaj flankoj florante kreskis juna betularo, kelkloke brilis multkolora herbejo kun siaj beroj kaj floroj. Tie-ĉi estis videbla ĵus bruligita nigra ekkulturitejo kun siaj brunaj randoj, tie jam floris flavantaj spikoj inter la ŝtupoj. Maldense ili vere staris kaj malbonaj ili estis, sed la koro de arbarloĝanto, vidante ilin, estus pro ĝojo ekbatinta, ĉar tie ĉi tamen estis ia espero.

Sur la altaĵo staris dometo. Tiel malbona kaj eta ĝi estis, ke oni apenaŭ povis ĝin opinii loĝejo de homoj. La muroj, kunmetitaj de neglatigitaj trunkoj staris per helpo de apogiloj. La tegmento preskaŭ disfalis kaj inter ĝia torfo elŝoviĝis longaj blankaj ŝelpecoj.

En la dometo oni vidis palajn vizaĝojn, malgrasiĝintajn korpojn. Tamen ĉiuj dormis trankvile. Senzorgeco, preskaŭ ĝojo brilis de iliaj vizaĝoj. La greno jam komencis flaviĝi kaj baldaŭ oni povos manĝi novan produktadon.

Krom la domanoj en la ĉambro estis du fremdaj infanoj. Ili estis orfoj. Epidemio forrabis de ili en tiu ĉi somero la gepatrojn kaj nun ili vagadis senhejme petante almozon.

Aero ekmalheliĝis. — Kio kaŭzis tion ?

La venena spirito de la marĉo ankaŭ tiun ĉi nokton ne povis dormi. Ĝi leviĝis de sia ŝlimlito, ŝteliris laŭ kampoj kaj levigis sur tuta regiono blankan nebulkovrilon. En

Höytiäinen, lago en orienta Finnlando, apartenanta al Pielisjärvi.

ĝin ĝi kovris ĉiun floretan, ĉiun spikon kiel karesema patrino kovras sian malsanan korinfaneton. Sed tiu ĉi kovrilo ne varmigis ; ĝi nur glaciigis, mortigis.

Frumatene vekigis viro en la dometo. Li eliris por admiri sian grenon.

Lia pala vizaĝo ankoraŭ pli paliĝis kaj la kapo kliniĝis sur la bruston. Emocio ŝajnis lin sufoki ; sed fine el profundo de l' koro eliĝis ekkrio.

Kion liaj okuloj vidis ?

Tuta grenkampoj estis glacie blanka kaj en la radioj de leviĝanta suno brilis la spikoj tiel gaje kvazaŭ diablo mem en ili grimacas.

Ekkrio vekis la edzinon ; ŝi alvenis... Dum longa tempo oni aŭdis nur pezajn ekspiregojn kaj amaraj larmoj fluis laŭ ŝiaj vangoj.

Sed poste la vizaĝo de l' viro heliĝis. Li krucigis siajn manojn kaj diris serioze : „Dio donis, Dio prenis, laŭdita estu Lia nomo eterne.“ „Amen,“ diris la edzino sekigante siajn larmojn.

Serioze, trankvile ili revenis en la dometon.

Tie la infanoj jam vekigis : „Patro, ni malsatas!“ ili kriis al siaj gepatroj. Momenton doloro tordis buŝon de l' patro, sed li sin retenis. Serioze li prenis el ŝranko la lastan panon kaj tranĉis pecon al ĉiu infano.

La almozuloj staris pli flanke rigardante tion per deziremaj okuloj. La viro hezitis momenton, sed poste li tranĉis de pano ankoraŭ du pecojn kaj donis al ili. Tion farinte li turniĝis al sia edzino kaj diris : „Morgaŭ ni devos foriri por serĉi laboron en alia loko ; tie ĉi ni ne plu povos resti.“

Suonio, verkista nomo de prof. Julius Krohn, (1835—1888) ; li estas tre amata finna verkisto kaj poeto, siatempe plej produktema. S. S.



DEK NOVAJ PROVERBOJ

Ne ekzistas baro kontraŭ la eraro.
Dio komencas, diablo renversas.
Juna diboĉulo, maljuna almozulo.
Sciigita sekreto ne plu estas sekreto.
Sano konservita, mono ŝparita.
Vorto movigas, monero kurigas.
Ne ĉiam saĝo venas kun aĝo.
Kapo direktas, koro difektas.
Ordoni kaj oron doni diverse efikas.
Ne kaptita bonŝanco, superflua kvitanco.

Voĉo.

EL SCIENCO

Dr. STAN. KAMARYT:

VIVECA ELANO

Tiun ĉi ideon enkondukis en filozofion la glora franca filozofo Henri Bergson. Ĝi estas laŭ li la esenco de la tuta universa vivo sed ne tiele, kiele prezentas al si tian substraton ia finalisma aŭ kaŭzalisma sistemo. Elano estas la esenco de la vivo mem, sed ne kvazaŭ kaŭzo nek kvazaŭ celo. Ĝi signifas la plej fundan kaj la plej elementan fakton de la viveco. En nekonataj sed certaj momento kaj punkto ĝi estiĝis kaj disvolviĝadas daŭre kreante la diversegajn formojn de la vivo, kaj formante la materion en diversajn formojn de objektoj. Ĝia disvolvigo iris laŭ tre malsimilaj direktoj: vegetaloj estas unu poluso de dikotomia disiĝo, animaloj la dua. Sed en ĉiu el tiuj du branĉoj la vivo denove diversfoje kaj diversmaniere disvolviĝadis.

Inter la animaloj du direktoj estis speciale preferataj de evoluo: la unu ĉe la vertebruloj, la dua ĉe la insektoj. Ĉe la unuaj evoluis la intelekta flanko, ĉe la duaj la instinkta. Sed neniam povas ekzisti sola intelekta aŭ sola instinkta kapablo. Ĉar ambaŭ estas produktoj de la komenca elano, kies ili ambaŭ estas du flankoj, el nealkulebla granda nombro de kapabloj kaj evoluopovoj. La viveca elano, laŭ vortoj de Bergson, havas sian esencon en la bezono kreadi. Ĝi ne povas esti absolute krea, ĉar ĝi por instrumento havas la materion, tio estas movon kontraŭan al sia propra movo. Sed ĝi estriĝas de tiu ĉi materio, kiu estas la neceso mem, kaj penas enigi en ĝin kiom eble plej multon da libereco kaj maldetermineco.



MUC. RIEDL:

INSULINO

Novaj esploroj kaj moderna terapio vivas nuntempe en epoko de gravaj sciencaj sukcesoj. Ĉiu jaro alportas donace novan surprizon, novajn faktojn, kiuj senfine detruas kaj rekonstruas direktojn, en kiuj homaro progresas. Lastaj monatoj en pasinta jaro alportis interesan aperigon de nova kuracilo kontraŭ diabeto, promesanta esti va-

lora armilo en manoj de kuracistoj kontraŭ ĝi. Insulino estas ekstrakto de l'pankreato (ĉeĥe slinivka břišní), glando, enhavanta t. n. insuletojn de Langerhans, kies produkto estas daŭre sekreciata en sangon, tenante normalan staton da sukero en ĝi. Rilato inter ambaŭ likvidaĵoj estas grava por ĥemiaj procedoj en homa korpo, kies harmonio estas necesa por sano. Kiamaniere penetras insulino en sangon ni ne scias, oni nur povas konstati, ke ĝi ekzistas ĉi tie. Celo de kuracado estas simpla: doni al diabetuloj eblecon starigi disfalon de karbonhidratoj, kaj forigi patologian kreadon de sukero, kiu per urino foriras kaj estante tre grava al vivo, homan korpon malfortigas ĝis pereco. Ĝis nun ni ne konas insulinon puran, kiel bezonus kuracistaj metodoj. Oni vendas akvan, senbakterian solvaĵon el freŝa pankreato, ricevitan per kombinita frakciiga distilado. Metodo de dro Fisher (Chicago) estas jena: Pankreato eltranĉita el besto estas dispecetigita kaj surverŝita per miksaĵo de akvo, alkoholo kaj acido acetika. Tie ĝi restas ĉe 10° C kelkajn horojn kaj poste estas submetita al malgranda temperaturo dum 12—24 horoj. Ricevita fluidaĵo estas distilita kaj donita en ampulojn al injektoj.

Komencanta kuracado estas sukcesa nur en tiuj okazoj, kie oni povas difini precize kvanton da sukero en sango. La uzado estas danĝera en okazoj de rena glikozurio aŭ t. n. diabetes innocens (diabeto sendanĝera), kiam malsanan staton ne kaŭzas malsufiĉa konsumado de karbonhidratoj, sed patologia stato tute alia. La renoj ne povas konservi normalan rilaton de glikozo en sango.

Per insulino kvanto da sukero en sango malpliĝas kaj baldaŭ aperas kiel simptonoj angoro, pulsdifektoj, korpo estas lacigita. Malforteco, kapturigo, okuldifektoj, granda supermezura ŝvitado estas gravaj simptomoj de ekestanta danĝero, kiu minacas la vivon kaj ni estas devigitaj rapide injekti sukeron. Unue oni uzis du diversajn preparatojn, nome anglan kaj usonan. Lastatempe oni decidis preskribadi usonan kiel pli bonan, ĉar ĝian efikon garantias Medical Research Council.

Insulino estas, kiel ni supre diris, injektita dufoje en tago, nome matene kaj posttagmeze, ĉiam duonhoron antaŭ manĝo.

La preparato estas multekosta, sed efikoj, nome en bonvalutaj landoj estas belaj,

kiel ni povas ekscii el statistikoj de Fletscher, Banting kaj Campbell.

Multaj malsanuloj alportitaj en sanatoriojn en lasta stadio de diabeto (=coma) hodiaŭ post uzado de insulino vivas kaj estas kapablaj funkcii en siaj okupadoj. Cetere plej proksima estonteco montros efikojn ĉe ni.

POR KOMENCANTOJ.

MALNOVAJ KONATULOJ. En zoologian ĝardenon venis du vilaĝaj infanoj kun patrino. Kiam ili venis al la lageto, la kvarjara knabo ekvidinte cikonion haltis en ĉarma pozo kun klinita korpo kaj kun manoj sur la dorso kaj ekvokis: „Cikonio, ĉu ci ankoraŭ rememoras pri mi?“ (A. Stépán)

PAPAGO KAJ FRUGILEGO. (Fablo de persa verkisto Saadi.) Papago estis malliberigita kun frugilego en la sama kaĝo. La papago indignigita pro ĉi tiu kompanio, ekkrias: Kia malbeleco! Kia maldelikata konduto! Kia krianta voĉo! Kia malbela plumaro! Mi dezirus, ke ĉi tiu birdo estu de mi tiom malproksime kiel la levigejo de la suno de ĝia kuŝigejo. Dum ĉi tiu tempo la frugilego entirante siajn ungegojn pro kolero, diris: „Certe mi naskiĝis sub malfavora stelo! Kia diferenco inter mia pasinteco kaj mia estanteco! Foje mi ripozadis sur muro kun miaj kamaradoj, kaj jen, nun mi estas kondamnita vivi kune kun ĉi tiu estaĵo aroganta, malsprita kaj babilema! Ĉu mi iamaniere kulpigis por meriti ĉi tiun malfeliĉon.“ Oni sentas sin feliĉa nur kun siaj egaluloj.

LEONO, AZENO KAJ VULPO. (Fablo de greka verkisto Aisopo.) Leono, azeno kaj vulpo ĉasis kune. Post kiam ili kaptis multon da ĉasaĵo, la leono diris al la azeno, ke li distribu la kaptitaĵon. La azeno obeis kaj farinte tri egalajn partojn li petis la du kunulojn, ke ĉiu prenu la sian. La leono ekfuriozinte tuj sufokis la azenon kaj ordonis al la vulpo, ke li disdividu. Estante ruza la vulpo donis preskaŭ ĉion al la tirano, kaj konservis nur malgrandan parton. — „Bonega besto“, ekkriis la leono, „kiu intruis vin fari partojn tiel juste?“ „Ĉi tiu“, respondis la vulpo montrante al la senviva azeno.

BRAMANO KAJ TRI FRIPONOJ. (Hinda fablo el libro Panĉa Tantra de Bidpaj.) En la arbaro Gaŭtama vivis bramano nomita Prastutojoĝna, kiu unu tagon aĉetis kaprinon en najbara vilaĝo kaj portis ĝin hejren sur ŝultroj. Tri friponoj vidante lin diris al si, ke estos eble ruze ŝteli la kaprinon de li. Ili do lokis sin sur lia vojo je distanco unu de la alia kaj atendis lin. La unua haltigis lin kriante: „Bramano, kial vi portas ĉi tiun hundon?“ — „Ĝi ne estas hundo, sed kaprino“, diris la bramano. Post kelkaj momentoj la dua homo ripetis la saman demandon. La bramano haltinte metis la kaprinon sur la teron, meditis, poste reprenis ĝin kaj daŭrigis sian iradon. Baldaŭ la tria fripono kriis al li: „Kial vi portas hundon, malpuran beston, sur ŝultroj?“ „Certege ĝi estas hundo“, diris la bramano, „ĉar ĉiuj diras tion.“ Li forĵetis la kaprinon malproksimen de si, purigis sin kaj lasis la rabojn al ŝtelistoj. (Trad. Rud. Fridrich)

NOVA EŬROPO

LA VIRINOJ EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

Verkis Františka Plamínková. El la ĉeĥa manuskripto tradukis Marie Cimrová.

(Daŭrigo)

Dum la lastaj jardekoj la virinoj estas akceptataj ankaŭ en aliaj publikaj ŝtataj, landaj kaj komunumaj oficoj, sed ĝis la revolucio ili estis sole helpantinoj kaj skribistinoj, ankaŭ tiam, se ili absolvis mezgradajn lernejojn. Oni ne permesis al ili fari fakajn praktikajn ekzamenojn bezonajn por laboro en tiaj oficoj sole pro tio, ke ili ne havu rajton okupi oficon de pli alta rango. Hodiaŭ post kvin jaroj de sendependeco ŝajnas al ni, ke tiu maljusteco estis sole peza sonĝo.

Dum la respubliko estis malfermitaj novaj laborfakoj por virinoj. Kelkaj okupas sufiĉe influajn funkciojn. En ministerioj de sociala zorgo, de instruado, de higieno estas raportistinoj por diversaj aferoj, plue instruktorinoj, industriaj inspektorinoj, profesiaj zorgistinoj, ĝeneralaj zorgantinoj (zorgistinoj por eksteredzecaj infanoj de siaj distriktoj). La virinoj estas raportistinoj en diversaj korporacioj por sociala zorgo, precipe por protekto de junularo, en tribunaloj por gejunuloj, en konsilejoj por protekto de virinaj interesoj — por helpo al virinoj en plej diversaj nenormalaj sociaj cirkonstancoj; ili estas estrinoj en laborperejoj, en dispensejoj, konfidantinoj en lernejoj (por esplori familiajn cirkonstancojn de gelernantoj, kaj entute por rilato de familio kun lernejo); ili estas „patrinoj“ de malriĉuloj kaj socialaj „fratinoj“ en virinaj malliberejoj k. t. p. Nun la virinoj estas okupataj preskaŭ en ĉiuj branĉoj de publika administrado, sed tre malofte en funkcioj de estroj (en poŝtservoj estas la virinoj jam de la aŭstria regado allasitaj kiel poŝtetrinoj). En teorio ne estas preskaŭ iu fako (krom predikisto de katolika eklezio kaj militservo) kiu restus al virinoj fermita; sed en praktika vivo apartaj grupoj de oficistoj defendas sin — jen kaŝe, jen malkaŝe — ke la virinoj atingu la superajn laborŝtupojn, ekzemple oficon de estroj. Sed tio ĉio bezonas sole tempon. Kiam estos sufiĉe da virinoj, kiuj atingis regulan teoriantan scion,

kiun oni en Eŭropo tre akcentas, ili atingos oficojn, al kiuj ili havas rajton malgraŭ ĉiuj artefaritaj malhelpaĵoj. Malnovaj antaŭjuĝoj enradikiĝintaj en la homa karaktero ne mal-

oj — la virinoj estos forpelataj el pli bonaj metioj (tipografio) aŭ el tiuj, kiuj estas praktikataj dum nokto, per kio malvastiĝus la laborkampo de virinoj.



Vojtěch Hynais: Kurteno (meza parto) de la Nacia Teatro en Praha.

aperas facile — kaj politikaj revolucioj ne estas identaj kun la interna aliformiĝo.

En metia kaj komerca fakoj kreskas la nombro de ellernintaj virinoj. La limigo de virina laboro en industrio estas starigita laŭ decido de konvencio en Bern. La delegitinoj de fakaj organizaĵoj el Ĉeĥoslovaka respubliko en Washingtona Konferenco de Laboro defendis vidpunkton de libera laboro por sanaj virinoj; en ĉeĥoslovaka respubliko oni ne bezonas timi, ke la virina laboro estos malbonuzita; male, estas danĝero ke per tiel nomata protekta leĝo kontraŭ laboro en nokto aŭ en diversaj industri-

PRI NIA BILDO

La bildon pentris fama pentristo Vojtěch Hynais, kiu atingos en tiu ĉi jaro 70 jarojn de sia vivo. Li studis en Wien kaj en Paris, kie li loĝis multajn jarojn. Ĉar la kurteno estas konceptita kiel gobelino, estis necese konservi la karakteron de la ebena. Tial neniu linio en ĝi, nek pozo nek koloro speciale atentigas pri si, sed la tuto faras kvietan impreson. La pentraĵo prezentas alegorie konstruadon de la teatro kun helpo de la tuta popolo.

* * *

En tiuj ĉi semajnoj (Ĉeĥoslovakioj rememorigas al si, ke antaŭ cent jaroj naskiĝis ilia plej amata komponisto Bedřich Smetana. En la venonta n-ro ni alportos koncernan artikolon kun ilustraĵoj.

ESPERANTA MOVADO

PRI LA WIEN-A KONGRESO

Ni ricevis po unu ekzemplero (ŝajnas ke la scian en Praha) de 12paĝa, ilustrita varbilo, de aliĝilo kaj praktike aranĝita respondilo, kune kun 3 salutmarkoj. Jen koncize la enhavo:

La kongreso okazos la 6-13 Aŭgusto. Dum la unuaj 3 tagoj la ĉefa tasko estos la laboro por esp., la lastaj tri tagoj estos ĉefe amuzigaj kaj en la mezo troviĝos granda, publika, serioza manifestacio por esp. Jen interesa kaj laŭdinda provo pri reorganizo de la kongresa semajno.

Kotizo estas 50 Kĉ por ĈSR., favor kotizoj por familianoj ne ekzistas. Aliĝu tuj, ĉar post la 31. Marto la kotizo plialtiĝos je 30%*. Per plialtigo je almenaŭ 50% en junio kaj julio la LKK celas scii necese baldaŭ, sur kiu nombro de kongresanoj ĝi bazu ĉiujn aranĝojn. La kotizon sendu en rekomendita leteroj al Esperanto-Kongreso Wien (adreso sufiĉanta por ĉiaj korespondataĵoj) aŭ pagu per iu banko al Wiener Bankverein Wien, sur konton de Esperanto-Kongreso Wien.

La LKK. zorgas pri rabato ferojaj kaj pri pasportaj faciligoj.

Kongresejo estos Koncerta Palaco en la mezo de la urbo.

Kongresaj salutmarkoj kun bildo de „Fera gardisto“, surpinta ornamo de la Wiena urbdoma turo kostas: 200 ekz. 3 Kĉ, 500 ekz. 6 Kĉ, 1000 ekz. 12 Kĉ.**)

PASKA KONFERENCO EN ĜENEVO 1924

La Centra Komitato de la esp. movado kunvokas specialan kunvenon de UEA kaj Naciaj Societoj al Ĝenevo por la 20. Aprilo 1924. La kunveno devas diskuti la rimedojn por pli intima kunlaborado inter UEA kaj KR kaj raportoj pri la rezultato al la Wiena kongreso.

Ankaŭ necesas apliki la diversajn decidojn de la Venezia konferenco. Kunsidos ankaŭ Komerca komisiono de UEA. Invitataj estas komitatoj, delegitoj kaj subtenantaj membroj de UEA por eksterordinara kunveno pri apliko de Veneziaj rekomendoj

*) Tiu ĉi limtempo devus esti plilongigita, ĉar sekve de malfruaj informoj, ekz. niaj legantoj sciigis pri la enhavo de la unua komuniko nur fine de februaro, do 4-5 semajnojn antaŭ la templimo N. r.

**) Riceveblaj ĉe La Progreso.

koncernantaj servojn de UEA kaj pri la necesaj rimedoj por plifortigi la asocion.

El ĉeĥaj samideanoj estos prezentita al diskuto kaj interkonsento propono pri starigo respektive ĝeneraligo de gazetara servo.

Oni informas nin, ke sufiĉe komforta loĝo kaj manĝo en Ĝenevo kostos 10 frankojn svisajn, se oni anoncas sin tuj. La veturo Praha-Ĝenevo kaj reen, kostas 850 Kĉ. Partoprenontoj skribu al UEA en Ĝenevo. Samideanoj el ĈSR skribu ankaŭ al Ĉs. Asocio Esp.

ATENTINDA PROPONO

„Kiel mi pliperfektigu mian scion de esperanto?“ meditas ĉiu esperantisto fininta la kurson; la gramatikaj reguloj kaj la konstruo de la lingvo estas por li jam klaraj, sed por flua parolo mankas al li multaj necesaj esprimoj. Por ekzerci en la lingvo oni vizitas la klubajn kunvenojn, kie oni tamen plejparte babilas ĉefe kaj la celo restas neatingita kaj komencas fine ŝajni eĉ neatingebla.

Jen mi volas atentigi pri rimedo bona — elprovita. La legado de bonaj esperantaj verkoj, antaŭ ĉio de tiuj de D-ro Zamenhof kompletigos viajn sciojn certe kaj plej frue*). Nur oni ne devas legi avide kaj malatenti la lingvajn kaj stilajn detalojn. Kaj ĉi tion forigas mia propono: Oferu ĉiu el vi du — tri horojn por ellerni la Braillan alfabeton kaj poste dediĉu kelkajn horojn semajne por transskribo de iu verko de D-ro Zamenhof per Braila skribo. La utilo de via ago estos kelkoble: Unue vi certe pliperfektigos viajn lingvajn sciojn ĉe la zorga transskribado; ripetante dufoje, lege kaj skribe ĉiun frazon, vi bone atentus ĉiun detalon, kiun vi alie ĉe la rapida legado preterlasus — kaj due vi havigos grandvaloran legaĵon al niaj blindaj samideanoj, ebligas ankaŭ al ili pliperfektigi en la lingvo kaj kaŭzos sinceran ĝojon kaj veran ĝuon al ĉiuj, kiuj legante la verkon danke pripensos la transskribinton.

Interesuloj skribu al la redakcio de la Progreso, kiu sendigos al vi modelon de l' Braille alfabeto kun klarigoj, skribilaron kaj necesan paperon.

Bož. Vičková.

MEMBRA KUNVENO DE UEA EN PRAHA

Ĝi okazis la 8. Februaro 1924 en la ejo de E. Klubo Praha, kafejo Edison. Partoprenis 6) p. Prezidis S-ro Eiselt. S-ro Ginz, Vicdelegito de UEA legis leteron de S-ro Sklenčka, Ĉefdelegito, kun informo, ke Praha estas dua urbo en la mondo, laŭ la nombro de UEA-anoj, sekvante tuj post London. — S-ro Hromada, komitatano de UEA, faris duonhoran paroladon, en kiu li donis diversajn informojn pri UEA kaj akcentis, ke dank' al la organizaĵo de UEA la esp-a movado jam nun povas efektiviĝi, servojn, por kiuj iam la tuta mondo uzados esp-on. — S-ro Ginz raportis pri servoj de delegitoj, klarigis la neceson de multaj anoncoj komercaj en la jarlibro, invitante la membrojn por helpi varbi ilin. — Por 1924 aliĝis jam pli ol 60 membroj. Oni intencas aranĝi pli ofte similajn kunvenojn.

*) Atentu la nunajn malaltajn prezojn sur la lasta paĝo de ĉiu n-ro de la Progreso.

ĈEĤOSLOVAKIA TERITORIO DE U. E. A.

Februara cirkulero.

La januara numero de „Esperanto“ kuŝas sur Viaj tabloj — ĝia enhavo donas programon por Via laboro dum 1924. Ĝin refoje tralegu kaj Vin mem demandu: „Ĉu mi jam faris ĉion?“ —

Dum la XVI-a orientbohema laborkunsido 3./II. 1924 en Dvůr Králové n./L. interalie aperis jenaj interesaj proponoj:

a) ne nur varbi novajn membrojn kaj revarbi la malnovajn, sed krome kolekti monon por UEA. Tiu ĉi propono instigis al vigla diskuto, kies rezulto estis — unuanima malaprobo de la propono! La diskutintoj, inter kiuj estis fidelaj kaj spertaj UEA-anoj, konsente atentigadis, ke UEA bezonas daŭran, firman financon bazon. La monkolektoj taŭgas por unuopaj entreprenoj, sed ne por UEA, nia plej grava organizado internacia. La kunveno urĝe rekomendis, ke ĉiu esperantisto, kiu volas helpi al UEA, fariĝu ĝia membro, membro-abonanto, aŭ membro-subtenanto. La kunveno tiel montris saĝan komprenon de la situacio.

b) laŭ instigoj de diversaj parolintoj la sama kunveno rekomendas al la kluboj, dezirantaj mone subteni UEA, ke ili aligu kiel M aŭ MA kelkajn el siaj membroj, kiuj ne povas pagi la kotizon.

c) s-ro Aug. Pitlík, prezidanto de Ĉ. E. I., proponas aranĝi specialajn kunvenojn de UEA-anoj en la lokoj, kie estas sufiĉe vasta nia movado.*) Oni aranĝu tiajn kunvenojn kelkfoje dum la jaro kaj eĉ kun amuza programo. La supozebla enspezo estu uzata laŭ maniero montrita sub b).

Dum la II-a Ĉeĥoslovakia Kongreso en Liberec (Pentekoste 1924) okazos la unua teritoria kunveno de UEA-anoj kaj krome speciala kurso pri administrado por delegitoj de UEA (unuhora!). Proponojn kaj sugestiojn bonvole sendu al mia adreso.

Niaj delegitoj uzadu por siaj skribaj rilatoj — speciale kun neesperantistoj — konvenan leterpaperon kaj koverton! Se nia Centro en Genève aprobas mian proponon, mi ĉstus preta amase mendi taŭgan materialon. Prezo proksimuma: 100 leterpaperoj kaj 100 kovertoj kun emblemo kaj firmo de UEA, sub kiu ĉiu delegito povos meti sian adreson per stampilo, Kč 20. Por havi ideon pri la nombro mendota mi petas antaŭmendojn.

Se Vi bezonas helpon aŭ konsilon, bonvolu unue relegi la cirkulerojn en la antaŭaj numeroj de „La Progreso“ kaj se Vi ne trovos la bezonatan, nur tiam skribu al mi.

Se Vi sendas monon al mi, neniam uzu poŝtmandaton. Al ĉiu mi laŭbezone sendos kelkajn pagilojn de la Poŝta Ĉekoticejo. Uzante tiajn pagilojn Vi ŝparos monon Vian kaj mian!

En Hradec Králové, la 10-an de februaro 1924.

O. Sklenčka, ĉefdelegito de U. E. A.

*) Pri tiaj kunvenoj parolas jam la § 23. de la statuto de UEA. N. de la red.

Vi parolas pri centmiloj da esperantistoj, pruvu, ke ili estas almenaŭ dek mil. U. E. A. bezonas 10.000 membrojn . . . kaj atendas ankaŭ VIAN aliĝon.

RADIOTELEFONA PAROLADO EN PRAHA

Kiel ni informis en la antaŭa n-ro, ĝi okazis kaj bone sukcesis, la 30. Januaro en Kbely apud Praha, aranĝita de la societo Radiojournal. S-ro Pitlík parolis pri Turismaj vizitindaĵoj de Ĉeĥoslovaka Respubliko (Praha, banlokoj, grottoj de Moravia Kras kaj montaro Tatry). Grupo de Praha'aj samideanoj aŭskultis en la halo de Radiojournal. La komencon iom prokrastis difekto de la aparato, sed poste ni aŭdis la tutan paroladon klare kaj forte aŭdeblan.

Informoj pri tio, kie la parolado estis aŭskultata, venis de samideanoj el Liberec, Král. Dvůr, Olomouc, Opava, Wien, Königsberg, Luzern, St. Gallen, Montier (Svis.), Trident, Liège (Belg.).

Krom tio al Radiojournal povis esti prezentitaj gazetaj raportoj el tiuj ĉi urboj kaj el pluaj: München, Kovno, Rotterdam, Hengels, Michelen (Belg.), Liverpool, Glasgow, Genève kaj Venezia.

Jam tiu ĉi nombro de eksterlandaj informoj, kiuj montras la intereson vekitan en eksterlando per tiu ĉi esp-a parolado, surprizis la societon Radiojournal kaj decidigis ĝin aranĝi alian paroladon.

Montriĝis ankaŭ ĉi tie, ke ĉiu simila entrepreno, kiu devas esti nova sukceso de nia lingvo, akiras nur tiam plenan sukceson, se la eksterlandaj samideanoj raportas pri ĝi en gazetoj de sia loko kaj sendas pruvon de tio. Nenio efikas pli ol tiaj leteroj aŭ eltranĉaĵoj el fremdlingvaj gazetoj.

RADIOTELEFONAJ PAROLADOJ
PRI ĈEĤOSLOVAKIO

Sekve de la sukcesinta parolado pri Ĉs. turismaj allogaĵoj, aŭskultita en ĉiuj partoj de Eŭropo kaj priskribita en multaj ĵurnaloj diversnaciaj „Radiojournal“ de Praha aranĝos el sia stacio Kbely apud Praha (ondo 1150 m) la jenajn esperantajn paroladojn de s-ro Pitlík:

1. Dimanĉe, la 2. Marto je la 21 h. (centroeŭropa tempo) pri la plej eminenta ĉeĥa komponisto Frederiko Smetana, kies centjaran naskiĝan datrevenon la ĉeĥa nacio kaj Ĉeĥoslovakio solenos kaj kies opero „Vendita fianĉino“ estis prezentita en ĉiuj ĉefaj operejoj de la mondo. La paroladon antaŭiros koncerto radiotelefona (de la 19 h. 15 m.—21. h.) enhavanta ĉefajn komponaĵojn de Smetana.

2. Lunde, la 17. Marto je la 21 h. (c. t.) pri „Specimena Foiro de Praha“ la 16. III. malfermota. (La parolado okazas je speciala peto de la foirestraro.) La paroladon antaŭiros de 19 h 15 m koncerto.

Esperantistoj, delegitoj de UEA., raportu en Viaj naciaj gazetoj pri la paroladoj, instigu la muzikantojn, komercistojn kaj fakulojn aŭskulti kaj nepre sendu la rilatajn gazetartikolojn por Radiojournal al A. Pitlík, Praha II. 1999. En Viaj manoj estas la venko de Esperanto en ĉeĥoslovaka radiotelefonio, kiu estos ankaŭ Via venko!



LINGVA FAKO

VORTARO ESPERANTO-ĈEĤA

Kompletigo de Rud. Hromada,

(Daŭrigo.)

Vortoj, netroveblaj aŭ korektindaj en la Vortaro esp-ĉeĥa de Th. Čejka. Signo (n) signifas nova, ne rekomendata vorto.

E -e o j jen v bot., odvozuje jména druhů zejména typického představitele: rozej růžovité

e bonito ebonit

e buro slonová kost

e delvejsa protěž

e ferveski ŝumėti (únikem plynu z kapaliny),

e gido ochrana, přízeň, zástita [perlitu se

e glefino bachně (druh tresky)

e ĝo hrana, hřbet (tělesa)

e kranu plenta (u kamen), projekční plátno

e kspontanu mocnitel, exponent (mat.)

e kspozu (n) vystavovati; -antu j

e kstravagancu výstřednost

e kvinkso rovnodennost

e kvisetu přeslička

[přepjatost

e kzalti vzrušiti; -ita; -(it)eco vzrušení, vytržení,

e kzekucio (n) provedení rozsudku, -i, -isto;

2) zájem, zabavení (soudní)

e manu prýštitu, vycházeti (o plynech a paprscích)

-adu, -aĵo, radiuma emanaju; -o výron

e mulsiu emulse

[(sily)

-end (n) co má býti, pagenda fakturo účet k pla-

engraŭlo anšovka (přir.)

[ceni

e nketo anketa, šetření, porada

e ntjero celek (mat., oproti zlomku) [chet)

e nverguro rozsah, rozpětí (křídla), uvázání (pla-

ergoto 1) námel 2) ostruha (na př. kohouti)

e ring(i)o máčka

[atmosferickou)

e rozio erose (rozhodání, porušení hornin vodou

e rudicio erudice, věd, vzdělání, učenost, sběhlost

e samenu roj, shluk (na př. včel), -i rojiti se

e spozu exponovati, vystaviti (světlu) [přihradami)

e taĝero, etaĝero, etaĝaro etaĝer, stojan (s

e ŭforbio pryšec, -eoj; -acoj; -aloj

e ŭfrazio světlík (bot.)

e volui vyvíjeti se, -o, -igi

Faco ne (Ĉjk) líce, nýbrž: líc, přední strana, na

př. martelfaco; -eto ploška (broušená)

fagopiro pohanka (bot.)

fagoto fagot (muz.), -isto

fanerogamoj rostliny jevnosubné

farbo barva (hmota barvivá)

farĉo nádivka ze sekaného masa

farmakopeo kniha léků

feki vyprázdniti střevo, káletí; -adu, -aĵo

fekunda plodný; -eco; -igi

feldspato živec (minerál)

fer-, bendofero pásové železo, stango-ty-

čové, forĝebla fero kujné železo

ferioj prázdniy

fermato koruna, výdrž (muz.)

fibulo kost lýtková; 2) spona (chráněný špend-

fikcio fikce, domněnka, smyšlenka [lík)

filadelfo pustoryl, jasmín český

filamento tyčinka (bot.)

filigramo vodní znamení (u bankovek, pošt.)

filmo film, -i

[zn.)

firsto hřeben střechy

(Daŭrigo.)

PŘEKLAD II. TEXTU

Malliberejo de la Tempo. Ĝi estas malliberejo¹⁾ ŝajne senfina²⁾, nehavanta kradojn, murojn, nek katenojn kaj tamen ne estas eble foriĝi el ĝi³⁾. Ni ĉiuj estas ĝiaj arestitoj⁴⁾ de la naskiĝo ĝis la morto⁵⁾, eĉ post la morto. Certe⁶⁾ ni ne sentas ordinare ĝian pezon⁷⁾. Sed provu forkuri⁸⁾ el ĝi! Vestu vin⁹⁾ alie ol la tempo postulas, pensu alie ol ĝi ordonas¹⁰⁾, ekskuu la katenojn¹¹⁾ de ĝia moraro — kaj vi tuj¹²⁾ fariĝas frenezuloj. Ni ĉiuj trenas ĝiajn pezajn katenojn ne sole sur la korpo sed ankaŭ sur la animo kaj la koro, kaj ĉiu provo senigi sin de ili finiĝas tragike aŭ almenaŭ komike. Vi kontraŭdiros¹³⁾ ke la homa penso povas forlasi la malliberejon de la tempo, ke ĝi povas libere¹⁴⁾ flugi en la pasintecon aŭ estontecon, ke ĝi povas krei por si liberan¹⁵⁾ mondon, nekatenitan¹⁶⁾ de la tempo. Vi citos¹⁷⁾ kontraŭ mi la romanojn de Čech, Wells, Bellamy kaj aliaj aŭtoroj, kiuj rompis¹⁸⁾ la katenojn kaj elflugis¹⁹⁾ per kuraĝa fantazio el la karceroj de la tempo. Sed ĉu ĝuste²⁰⁾ tiuj ĉi sentimaj provoj ne pravas, ke estas neeble eliĝi el la malliberejo de la tempo? Pensante ke vi por momento forkuris el la malliberejo, vi konstatas²¹⁾ subite, ke via kuraĝa penso estas fatamorgano²²⁾, en kiun projekciĝas²³⁾ ombroj de la netransireblaj²⁴⁾ kradoj.

1) též karceroj, 2) senlima, 3) ne ekzistas foriro, 4) kaptitoj, 5) nikoli ĝis al, 6) ja, 7) ŝarĝon, premon, 8) foriĝi, foriri, 9) nikoli vestigu vin, 10) diktas, 11) lepi než předložkou, 12) tiu momento, 13) oponos, 14) laŭvole, 15) neĝenatan, 16) nikoli nekatenigitan, 17) nikoli enkondukos, 18) disŝiris, 19) eligis sin, 20) nikoli ĵus, 21) trovas, 22) himero, 23) zde nikoli estas projekciataj, 24) netranspaŝeblaj.

VÝSLEDEK

Došlo nás 26 překladů II. textu, z nichž celkem vyhovovalo 22. Vylosovány byly tři práce, jež budou odměněny opět knihou P. Bennemann: Tra la mondo II. parto. Práce ty zaslali: sl. Vavřínová Milada (Holice), p. Odehnal Ant. (Kroměříž) a p. Válfka F. (Brno).

IV. TEXT K PŘEKLADU

Konej cviky dechové !* Dýchání je ještě důležitější než jídlo, protože bez něho nelze žít. Dýchej vzduch čerstvý a proto pilně větrej svůj příbytek. Vyvětraný byt se také lépe vytápí než byt uzavřený. Cviky dechovými rozšíříš hruďník, zneможníš nákazu tuberkulosní a máš-li ji, ulehčí se ti. Dýcháním hlubokým nabudeš netušených sil, protože dechem do sebe přímo čerpáš energii vesmírnou, obsaženou v kyslíku vzdušném. (Dr. A. S. Batěk.)

LINGVAJ RESPONDOJ

Oprava. Arĝentnitrato — dusiĉnan stříbrný (dle čl. nomenklatury nyní platné), ne stříbrnatý (jak se říkalo podle staré).

* Z lednového čísla Zpravodaje z Kéžby byl, vydávaného Drem Alexandrem Sommer-Batěkem, Břevnov 30. Ročně 10 čísel za 10 Kč. Doporučujeme!

BIBLIOGRAFIO

Libroj

MONOGRAFIO PRI ESP. PREPOZICIOJ (Eugen Wüster: Die Verhältniswörter des Esperanto. Esperanto. Verlag Ellersiek & Borel. Berlin-Dresden 1924. Pĝ. 36. Prezo 1'55 fr. sv., 10 Kĉ.)

Ĉiuj verkoj de Wüster estas valoraj riĉigaĵoj de la esperanta literaturo, malriĉa je teoriaj esploroj kaj analizoj, ĉar ili ĉiuj estas produktaĵoj de serioza laboro de la kapabla kaj diligenta specialisto, kiu sola pro siaj kompetenteco kaj produktemo valoras pli ol iuj liaj kritikantoj. Eĉ tiu, kiu ne volas aŭ ne povas ĉiam akcepti liajn tezojn, devas respekti la kapablecon, seriozecon kaj laboremon de tiu ĉi vera esperanto-lingvisto kaj la praktike utilajn rezultatojn de liaj profundaj teoriaj esploroj. Ankaŭ tiu ĉi — bedaŭrinde ne esperanta, sed germanlingva — monografio de Wüster pri esp. prepozicioj multe helpas al la leganto kompreni la funkciojn de prepozicioj kaj uzadi ilin precize (ni havos la okazon kritike resumi la verkon en „Lingva fako“). Estus tre bone, se oni estus eldoninta tiun ĉi ĝeneralan parton kune kun la speciala el la vortaro de la eminenta aŭtoro.

b ŝ k.

EISENBahn-WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO. Verkita de Georg Habelok laŭ komiso de la Germana Asocio de Fervojistoj. Eldono de l' aŭtoro mem. P. 59. 13×21 cm. Hektografita. — Verketo kiu estas interesa provo de fervojista terminaro. Ĉu iu el niaj fervojistoj okupos sin per prizorgo de la ĉeĥa traduko? Skribu al ni!

HELIOS. Eldono de Esperantský Zpravodaj, Praha II., Malá Štěpánská 6. — Luma ludo, en kiu elektra lampeto montras al vi respondon al demandoj pri esperanta movado, pri komponistoj de operoj ktp. Prezo 45 Kĉ afrankite. Mendebla ĉe la administracio de la Progreso.

SUB LA NEĜO. J. J. Porchat. Trad. J. Borel. 2-a eldono. Esp. Biblioteko Internacia n-oj 29-31. Eldonis Ellersiek & Borel Berlin. 120 paĝoj 9¹/₂×14 cm. Prezo 0'75 gmk (ora marko), 6 Kĉ.

LA AMKONKURANTOJ. Triakta komedio originale verkita de Rh. Schmidt. N-ro 32 de la antaŭa kolekto. 45 p. Prezo 0'25 gmk (2 Kĉ).

NATAN LA SAĜULO. Drameca poemo de G. E. Lessing. Trad. Karl Minor L. K. Nova Esperanto Biblioteko de la sama eldonisto. 11×16 cm. 231 p. Prezo 2 gmk (16 Kĉ).

ESPERANTO-BRIEFWECHSEL FÜR KAUFMANN. Max Butin und Friedrich Jahn. Deutsch-Esp. Bücherei n-o 5. La sama eldonisto. 52 p. 12×18 cm. Prezo 0'75 gmk (6 Kĉ).

SPOKEN ESPERANTO. By the direct method for beginners. Kompilita kaj eldonita de Norman W. Grosz, Cambridge 38, Mass. U. S. A. 92 p. 15×23 cm. Prezo 0'50 dolaro (17 Kĉ).

NOVĀ UĈEBNICE ESPERANTA pro Ĉeĥy. Sepsalí Dr. G. Žďárský a K. Procházka. Nákladem Jindř. Bačkovského v Praze. Str. 352. 16×11 cm. Cena 20 Kĉ.

KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp. laŭ senditaj informoj.

Novaj kursoj. En Josefov 18 p. instruas F-ino Scharfenbergerová. — En Malé Svatoňovice kurso por 10 p. — En Jablonné n./Orl. kurso por 19 p. — En Jičín S-ro Šikl instruas 36 p.

Soldata kurso. En Jičín okazas kurso por 45 soldatoj kun permeso de la estraro.

Societa vivo. Esp. Klubo Praha aranĝis la 7. Februaro teatran vesperon en restoracio sub Bellevue. Oni ludis la unuaktan komedion de Roksan: La perfekta kuiristino, en kiu precipe plaĉis al ni F-ino Crhová (Amerikanino) kaj S-ro Sustr (frandema Belmango). La vesperon finis gaje ludita unuaktaĵo de S-ro Pressburg: Kial do?, en kiu tri plibonigistoj de esp-o ridigis la multembran ĉeestantaron (100 p.).

Esp. Klubo Domažlice aranĝis la 30. Januaro amikan membran vesperon. Naciajn kantojn en esp-o kantis ges-oj: Echtnerová, Mrvík, Vašatka, Konrády. Al la prez. de la klubo, S-ro staciestro Köhler, liaj kursanoj honore dediĉis statuareton montrantan simbole la ideon de esperismo. Kunveno ĉiun duan jaŭdon en restauracio „u Holubů“.

6. regiona kunveno de orientbohemiaj esp-istoj okazis la 3. Februaro en Dvůr Král. n./L. Ĉeestis 50 personoj el 21 lokoj. Prezidis S-ro J. Foušek, advokato el Přebouč. Post lego de salutleteroj S-ro Sklenčka prezentis raporton pri la movado en la regiono kaj la proponon fondi regionan kason. Akceptita kaj tuj kolektita Kĉ 203.90. S-ro Ginz, sekr. de Ĉs. Asocio Esp. raportas pri ĈAE instigante subteni ĝian laboron per pagado de kotizoj kaj propaganda imposto. S-ro Pitlík raportas pri ĈEI, S-ro Sklenčka pri UEA. Sekvis debato pri msubteno al UEA (vidu detalojn en la cirkulero de S-ro Sklenčka sur la 47. paĝo de tiu ĉi n-ro). La venonta kunveno okazos en Trutnov, dum aprilo aŭ majo.

Ĉeĥoslovaka esperanta instituto malfermis sian klubejon en Mikulandská ul. 7. (Gastoj akceptataj estas ĉiumerkrede), aranĝis 10. I. paroladon de s-ro Eiselt pri „Esperanto en servoj de ĉeĥa homo“. 14. I. malfermis „Privatan esperantan lernejon“ aprobitan de la instruadministerio (no 131488-23), kiun vizitas sub gvidado de ŝtate ekzamenitaj esper. instruistoj Eiselt, Hlaváčová, Pitlík kaj Šupichová en 2 kursoj por komencantoj, 1 por progres. kaj ŝtata kurso — 82 lernantoj. — Radiotelefonan paroladon de s-ro Pitlík kaj ĝin akompanantan koncerton aŭskultis 31. I. la institutanoj kaj iliaj gastoj en „Radio-Journal“. — Okaze de la XVI a regiona kunveno de la orientbohemiaj esper. en Dvůr Králové paroladis 2. II. s-ro Pitlík pri Ĉeĥoslovakiaj turismaj atrakcioj, akompanante la paroladon per 120 lumbildoj. — Ĉ. E. I. ricevis por siaj turismaj celoj de la komerca ministerio 5000 Kĉ. — Je propono de Ĉ. E. I. komisiis la komerca ministerio svedan esperantiston L. Tell per gvidado de la ĉs. informoficejo en Stokholm, fiksinte lian komencsalajron je 20.000 Kĉ jare.


LABORISTA LIGO ESPERANTISTA


Sidejo : Plzeň-Karlov, Na pomezi 15 (Sokr. Büchl V.)
(Oficiala raporto, mallongigita)

Ĝenerala kunveno de Lab. Ligo Esperantista okazos 24 Februaro en Laborista Domo „Peklo“ (Kafejo) je la 9 horo matene. Skribajn proponojn estas eble enmanigi al la sekretario ankoraŭ antaŭ la kunveno. Ĉar la ĝeneralan kunvenon vizitos multe da reprezentantoj kaj gastoj, estas necese, ke ĉiuj funkciuloj estu kiel eble plej baldaŭ sur siaj lokoj. La agado estos en esperanto, nur salutoj de neesperantistoj aŭ petoj estos respondataj per ilia lingvo. Karaj gesamideanoj, ni pruvu, ke laboristaro komprenas bone signifon de Esperanto kaj ni diru al ni, ke estas jam tempo, ke ĝi estu parolata en ĉiu familio.

Laborista Societo Plzeň-Karlov aranĝis la 20 Januaro la duan ĝeneralan kunvenon. S-ro Pešek, prez. de LLE. trafe akcentis la signifon de esp. por mezklera homo. S-ro Novotný salutis en la nomo de metallaboristoj. S-ro Büchl estis reelektita kiel prezidanto de la grupo. — La 13. Januaro la Societo aranĝis paroladon de S-ro Jos. Pech pri „Dalmatio, lando de maro kaj suno“ kun 200 lumbildo. Ĉeestis 250 p.

L. Societo Plzeň-I. Ĝen. kunveno okazis la 23. Januaro en Laborista Domo „Peklo“. Elektaj: S-ro Keiser kiel prez., Ges-oj Pešek, Melková, Hovorka, Valeš kiel del. por la ĝen. kunveno de LLE. S-ro Pešek kondamnis la kontraŭesp-an artikolon en faŝista gazeto „Na Stráž“. S-ro Pech parolis pri Wiena kongreso.

L. Societo en Škvřiny. La ĝen. kunveno la 21. Januaro. S-ro Čeček estis reelektita kiel prez. S-ro Pešek, parolis pri gravaj aferoj de la movado kaj pri organizado de novaj grupoj.

L. Societo en Letná ap. Plzeň. Ĝen. kunveno la 27. Januaro en Laborista Domo. Elektita: S-ro Kodl kiel prez., S-ro Proskovec kiel sekr. S-ro Pešek parolis pri utileco de esp.

L. Societo en Podmokly n. L. Ĝen. kunveno okazis la 27. Januaro. S-ro J. Král, delegita de LLE. raportis pri laborista movado. S-ro Sála Emil estis reelektita kiel prez. B ü c h l V i l d a, sekr.

RESPONDOJ AL NIAJ LEGANTOJ

PREMIOJ AL ABONINTOJ. Sufiĉa kvanto da Fundamento de esp. venis el Parizo jam en tiuj ĉi tagoj kaj estas do dissendata. Ĝis la 10 Marto ĉiu rajtigito estos jam havanta unu el la premiaj libroj.

KURSESTRO. Vi plendas, ke nia gazeto ne skribas pri via kurso. Sed ni ja ne povas, ĉar vi kiel kursestro ne informis nin pri la kurso. Rajton plendi havas ni, ĉar samideanoj neinformantaj CAE pri siaj entreprenoj kaŭzas, ke nia movado ŝajnas poste, en la lumo de la statistiko, malpli forta ol ĝi efektive estas. Viaj informoj enhavu ciferojn, sed precizajn, ne troigitajn.

KURSA LEGAĴO. Vi povas tute bone uzi La Progreson. Kelkaj kursestroj ĝin uzas kun bona rezultato. — Se vi nepre deziras libron, mendu ĉe ni la legolibron Tra la Mondo II. (10 Kč.)


OFICIALA INFORMILO


de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
Praha-VII. Sochařská 333.

V. VALNÉ SHROMÁŽDĚNÍ SVAZU ČSL. ESPERANTISTŮ

koná se
v neděli dne 23. března 1924 o 9. h. dopol.
v kavárně Opera, Praha-III.
Harrachovo náměstí (za mostem Legii).

PROGRAM:

1. Čtení protokolu IV. shromáždění.
2. Zprávy funkcionářů.
3. Volby funkcionářů.
4. Návrh na stanovení ročního příspěvku 2 Kč ve prospěch světového centra esp.
5. Volné návrhy.

Nesejde-li se v ustanovenou hodinu dostatečný počet členů, koná se valné shromáždění o hodinu později za každého počtu přítomných.

Právo zúčastniti se valného shromáždění má každý člen Svazu, jenž zaplacení příspěvku prokáže svou legitimací. Nemůže-li se zúčastniti osobně, může hlas svůj odevzdati jinému členu, jemuž na důkaz toho dá svou legitimací.

Během soboty dne 22. března projektován je na veletržích esp. den s esp. výstavkou a přednáškami. V sobotu večer koná se v téže kavárně „Opera“ p ř á t e l s k ý v e č e r, k němuž zvou se vřele nejen pražští, ale i mimopražští esperantisté.

Valné shromáždění koná se v době veletrhů (16.—23. března), aby mimopražští členové mohli použiti 33% slevy na drahách, jež jim přísluší, zakoupí-li si veletržní legitimací za 25 Kč, na niž mají kromě toho volný vstup na veletrhy a nárok na ubytování.

Zúčastněte se v hojném počtu!

Výbor.

Příspěvky Svazu zaplatily kluby: Pardubice 16 Kč, Holešov 20 Kč, Bystrice p./H. 76 Kč. Žádáme, aby i ostatní kluby zaslaly příspěvky za dosa- vadní počet jich členů aspoň do valné hromady.

Propagační daň platili v únoru: E. K. Plzeň 11.—, B. Benetka (Kralupy) 12.—, generál Rambousek (Budějovice) 12.—, Kati Rambousková (Budějovice) 12.—, Ulver (Újezd Podhorní) 12.— a Toth (Č. Brod) 12, E. K. (Ústí n. Orł.) 38 úhrnem 109 Kč (!).

Por monumento de Zamenhof kolektis: E. K. Ústí nad Orlicí 300 Kč, E. K. Orlová 150 Kč, E. K. Praha 160 Kč, Rondeto de Esp. Praha 100 Kč. Informojn de aliaj kluboj ni ne ricevis.

Hromada R.

PROPAGAČNÍ ODBOR

PROTI ESPERANTU A PRO NĚ.

ROZPADNE SE ESPERANTO V DIALEKTY? Domněnka, že esperanto, jakmile bude mluveno velkým počtem lidí, rozpadne se v dialekty, (jak vedle jiných tvrdí Dauzat v *La philosophie du langage*, Paris, Flammarion, 1920) jest vědecky naprosto neodůvodněná (jak ukázal již profesor Smetánka ve své přednášce r. 1907, profesor R. Fridrich v revue *Čes. esper.* III, 1908-9 a v deníku *Čas* 31. 3. 1913). Při tom nehledíme ani k tomu, že esperanto, i kdyby se rozpadlo v dialekty, vykonalo by ohromné služby ve styku písemném a literatuře. Téměř 4 desetiletí lidé nejrůznějších národů mluví esperantem a přece na mezinárodních sjezdech není patrného rozdílu v jejich mluvě; i odstíny ve výslovnosti jsou nepatrné (tu lze ostatně předepsati a ustáliti fonografem). — Pronikavé změny jazykové v kulturních jazycích daly se vždy nesmírně pozvolně a dnes se nedějí už vůbec; působí proti nim jednotici, uniformující snaha o jednotný jazyk národní. U esperantistů strážcem jazykové jednoty je Jazykový výbor a vlastní snaha po jednotě (regulátorem výslovnosti jsou mezinárodní sjezdy a návštěva cizích zemí). — Jako latina středověku a renesance, tak také esperanto dneška nepotřebuje k své stálosti nějaké vlasti. — Prvé knihy esperantské jsou úplně srozumitelné esperantistům dnešním, neboť základy jeho zůstaly i když se slovník značně obohatil. — Esperanto je každému jazyk cizí, jehož se užívá méně často a proto pečlivěji nežli mateřštinou. — Jednotnost udržují časopisy a knihy odborně revidované před tiskem (od *Literatura asocio*, *Lingva komitato* a pod). — Esperantu se neučíme v útlém dětství zvykem a rutinou, ale ve věku, kdy je inteligence vyvinuta, pomocí knih a učitelů dbalých správnosti a jednotnosti. — Esperantem dorozumíváme se s cizincem a chtějíce, aby ten nám rozuměl, musíme se vzdáti všech národních, místních a osobních zvláštností jaz. (esp-isté ve vzájemném styku se opravují a tak jazykově jednotí). — Budoucí čilý styk esperantistů bude je nutiti k tomu, aby zamezovali vznik odchylek, které by vadily srozumitelnosti. Celkem tedy možno říci: nové dialekty nevznikají už v žádném jazyce kulturním a nevzniknou ani v esperantu. Předpoklad o vzniku dialektů, (neb aspoň variet regionálních, zemských, kontinentálních) není odůvodněn ani analogií s jazyky živými ani podstatou a cílem esperanta, je to pouze jedna z četných blýskutých frází, které jsou vědeckou — ostudou. R. F.

TEODOR FUCHS, býv. ředitel přírodopisného musea ve Vídni, mimoř. univ. profesor, dopisující člen rakouské akademie věd:

Vše, co můžeme žádati od mezinárodní společné řeči je esperantem dokonale splněno, ba překonáno.

Nejdokonalejší jednoduchost a logická přesnost stavby, jasnost a určitost výrazu, spojená s bezmála neomezenou schopností vývoje, jakož i obdivuhodná schopnost přízpůsobení jsou jeho základními rysy. K tomu se pojí jako vítaný přídavek lahodná zvučnost esperanta a konečně i jeho neobyčejná snadnost.

O ZAVEDENÍ ESPERANTA DO MEZINÁRODNÍCH POŠTOVNÍCH A TELEGRAFNÍCH STYKŮ se zasazuje mezinárodní esperantský svaz poštovních úředníků. Sebral nyní ve všech zemích mnoho tisíc podpisů důležitých institucí i osob, které jsou pro to, aby bylo používáno esperanta ve stycích poštovních správ a aby bylo uznáno řečí jasnou při telegramech. Svaz hodlá v této věci zakročiti při příštím kongresu světové poštovní unie. Provedení bude pak možno v době zcela krátké, jelikož jest mezi poštovními zaměstnanci celého světa znalost esperanta velmi rozšířena.

MEZINÁRODNÍ SVAZ KATOLICKÝCH UČITELŮ SCUDOS se sídlem ve Florensi koresponduje se svými zahraničními členy esperantsky. Vydal v tomto jazyku své stanovy a pošle je na požádání každému katolickému učiteli. Adresa je: Scudos (*Sodalitas Catholica Universalis Docentium Omnos Sancti*), Firenze 14, Via dei Pucci 2, Itálie.

LOTYŠSKÝ PĚVECKÝ SBOR ESPERANTSKÝ, již druhý v této zemi, se ustavil za vedení vynikajícího dirigenta H. Prusise v Rize. Vystoupil již několikrát s vybraným esperantským repertoirem na veřejnost a sklídl vždy velký úspěch. Sbor se hodlá odebrati též za hranice a uspořádá koncert snad při příštím světovém kongresu esperantském ve Vídni.

POVINNÉ VYUČOVÁNÍ ESPERANTU NA FRANCOUZSKÉ ŠKOLE. Soukromá vysoká obchodní škola dívčí Saune v Paříži vyučovala v minulém roce na zkoušku též esperantu a dosažené úspěchy byly tak dobré, že se správa školy rozhodla zavésti letos vyučování tomuto jazyku povinně. Geniální konstrukce esperanta a jeho snadno pochopitelná mluvnice byly podporou v studiu. Žákyně znající esperanto naučily se dokonale ovládati svůj mateřský jazyk a činily rychlé pokroky i při učení jazykům druhým.

ALBÁNSKÁ MLÁDEŽ SE UČÍ ESPERANTU. V italském státním obchodním učilišti v Bari bylo zahájeno esperantské vyučování za vedení universit. prof. A. Lacialdola. Kursy jsou hojně navštěvovány a zvláště se jich účastní albánská mládež, studující v Bari. V Albanii samé bylo esperanto zavedeno do učebné osnovy všech středních škol.



LABORISTOJ ATENTU!

Mi serĉas interrilaton kun ĉefaj samideanoj, seriozaj poresperantaj propagandistoj el la rondo de la ĉefa laboristaro. Nur vere agemaj kamaradoj komuniku siajn adresojn al kamarado Siegfried Feith, Wien VI. Gumpendorfertr. No 91; 2 Stege, Tür 14, Mezzanin.

ESPERANTA GRAMATIKO SUR POŝTKARTO

ricevebla ĉe R. Fridrich, Královo Pole, Purkyňova 79. **Nur kontante!**
10—3 Kč, 50—12 Kč, 100—20 Kč, 500—80 Kč,
1000—110 Kč. Petu specimenon kaj ĉekon;
Lernejoj rabaton!

